

Rudolf Alexander Schröder,  
Al la dianto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho dianto, rozfratin',  
vi stel-cirklo ronda, vere  
firme kaj eĉ pli fiere  
vi ja scias fermi vin.

Vian koron montras vi;  
sed du flamoj ruliĝantaj,  
konvulsie langumantaj  
arde brulas super ĝi.

Spic-odoron, fajron vi  
portas kvazaŭ el-infere,  
tamen ŝvebas en-aere<sup>2</sup>  
kiel flirta papili'.

Floras, kara amikin',  
ĉiam ĉe l' fenestro bele,  
akompanas vi fidele  
tra la tuta jaro min.

*Traduko de la Germana poemo "An die Nelke" de RUDOLF ALEXANDER SCHRÖDER (\*1878-01-26 – †1962-08-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-781-1565 (2013-01-19 13:52:21)*

Rudolf Alexander Schröder,  
An die Nelke

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas RUDOLF ALEXANDER SCHRÖDER (\*1878-01-26 – †1962-08-22).*

*Arg-781-1564 (2013-01-19 14:03:15)*

*Pri la poeto vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf\\_Alexander\\_Schr%C3%B6der](http://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Alexander_Schr%C3%B6der).*

---

<sup>2</sup>aŭ:

tamen ŝvebas vi leĝere  
kiel bela papili'.